

Jean de La Fontaine,
Le Corbeau et Le Renard

Maître Corbeau, sur un arbre perché,
Tenait en son bec un fromage.
Maître Renard, par l'odeur alléché,
Lui tint à peu près ce langage :
«Hé ! bonjour, Monsieur du Corbeau.
Que vous êtes joli ! que vous me semblez beau !
Sans mentir, si votre ramage
Se rapporte à votre plumage,
Vous êtes le Phénix des hôtes de ces bois.»
A ces mots le Corbeau ne se sent pas de joie ;
Et pour montrer sa belle voix,
Il ouvre un large bec, laisse tomber sa proie.
Le Renard s'en saisit, et dit : «Mon bon Monsieur,
Apprenez que tout flatteur
Vit aux dépens de celui qui l'écoute :
Cette leçon vaut bien un fromage, sans doute.»
Le Corbeau, honteux et confus,
Jura, mais un peu tard, qu'on ne l'y prendrait plus.

*Verkinto de tiu ĉi Franca poemo estas JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 – †1695-04.12).*

Arg-975-1963 (2014-03-13 13:10:40)

Pri la verkinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Jean_de_La_Fontaine.

Jean de La Fontaine,
La korvo kaj la vulpo

tradukita de Pejno Simono

Fraŭlo Korvo, jen arbopinte,
Tenis enbeke fromaĝon.
Fraŭlo Vulpo, tiun spurinte,
Voĉis allogan omaĝon.
“He, saluton, sinjoro Korvul’.
Vi bela! Vi rava! Vi ĝu’ por l’ okul’!
Sincere, se via fanfaro
Egalus al via plumaro,
Vi estus fenikso de l’ boska popol’.”
La Korvo ĝojegis ĉe tiu parol’.
Li por najtingali
La bekon malŝlosis, igante la predon elfali.
La Vulpo ĝin kaptis kaj diris “Bona mosto,
Ke flatado je l’ kosto
De l’ aŭdintoj bonvivas, lernu vi nu.
Valoras fromaĝon do tiu instru’.”
La Korvo, konfuza kaj honta,
Malfrue nun ĵuris pri klero estonta.

*Traduko de la Franca poemo “Le Corbeau et Le Renard” de JEAN DE LA FONTAINE (*1621-07.08 – †1695-04.12) en Esperanton de PEJNO SIMONO (Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23).*

Arg-975-1964 (2014-03-13 13:17:21)

Pri la tradukinto vidu la retejojn http://fr.wikipedia.org/wiki/Simon_Edward_Adrian_Payne respektive http://eo.wikipedia.org/wiki/Pejno_Simono.